

EKO 2023

**Pensu globe
Agu loke
Por la landa,
Fakaj kaj
Regiona
Laboro**

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komuniko



**Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj,
Komercestoj, Blinduloj, Kolektantoj**

EKO 2023 / 05. Januaro 20 2023

Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK

Novajoj de UEA por 2023

En la [januara numero](#) de la revuo *Esperanto* bonvolu legi la novjaran mesaĝojn de la prezidanto de UEA, Duncan Charters, (ankaŭ legeblan en la [Reta revuo](#)) kaj de la dua vicprezidanto Amri Wandel. La nuna mesaĝo celas doni pliajn informojn kaj bondeziri al vi feliĉan novan jaron 2023. La jaro 2023 denove estos defia kaj eventoriĉa por nia Universala Esperanto-Asocio. Pluraj aferoj ŝanĝiĝos, sed la Asocio daŭre liveros la kutimajn servojn al la membroj.

La Libroservo seninterrompe funkcias. Nia libroservisto konsentis deĵori kelkajn pliajn monatojn. La domo kie dum ses jardekoj estis la Centra Oficejo – en Nieuwe Binnenweg 176 – estas ofertata por vendo, sed ankoraŭ ne estas trovita aĉetanto por la prezo postulata. Jen via ŝanco, se vi deziras aĉeti ĝin aŭ konas potencialan aĉetanton! UEA plu funkcias jure en Roterdamo, el sia alia domo samstrata. La Arkivo de UEA nun funkcias laŭkontrakte en Vieno, prizorgata de la teamo laboranta por la Internacia Esperanto-Muzeo. La Biblioteko Hector Hodler daŭre troviĝas en Roterdamo. Por ĝi la Estraro serĉadas novan hejmon, kiu povos akcepti la tutan kolekton kaj prizorgi ĝin laŭ la plej bonaj kondiĉoj.

Post du virtualaj kongresoj en 2020 kaj 2021, ni revenis al kongresoj ĉeestaj, sed parte hibridaj (ĉeestaj kaj virtualaj). Post Ameriko (Montrealo) kaj Eŭropo (Torino), la Estraro serioze konsideras kongresi en Afriko en 2024: ĝi aktive prilaboras tiun ĉi eblon kaj ĉiuokaze anoncos la kongreslandon de la 109-a UK en 2024 **tre baldaŭ**. Ni invitas ĉiujn aliĝi al la 108-a Universala Kongreso, okazonta en Torino (29 julio - 5 aŭgusto): <https://uk.esperanto.net/2023/>. Membroj ĝuas rabaton.

Pro la sukceso de la 3-a Virtuala Kongreso (VK), UEA planas denove okazigi Virtualan Kongreson fine de 2023. Se vi ne spertis la VK-3, vi ankoraŭ povas tion fari (ĝis la fino de januaro) ĉe <https://vk.esperanto.net/2022/>. La aliĝo estas senpaga por individuaj membroj de UEA.

La Estraro kaj Ĝenerala Direktoro

EKO – serve al UEA kaj ILEI kaj miloj pli!

La 8a Afrika kongreso – oficiala raporto

La kongreso okazis kun granda sukceso, ĉar ĉeestis/partoprenis 55 esperantistoj el 17 landoj. Partoprenis: Burundo, Togolando, Madagaskaro, Tanzanio, DR Kongo, Kongo Brazavilo, Belgio, Senegalo, Germanio, Rusio, Usono, Meksiko, Hispanio, Islando, Francio, Brazilo kaj Italio. Trovu la plenan raporton pri la kongreso de la Afrika Komisiono alkröĉitan.

La kongresa temo estis: **ESPERANTO, ŜANCO KAJ NE MINACO POR AFRIKO**". Post diskutoj, ni alvenas al la jena **rezolucio**:

1. La Afrika komisiono kuraĝigu esperantistojn verki kaj ludi esperantajn filmojn por kontribui al la esperanta literaturo
2. Pro la eventuala UK en Tanzanio, la kongresanoj petas al AK okazigi la sekvan AKE en la sama jaro de UK en Afriko, kaj ĝi okazu aŭ en la kongreslando, aŭ en najbara lando, kaj en la sekva aŭ posta kongresa semajno.
3. Kaze ke UK okazu en 2024 en Tanzanio, kongresanoj rekomendis al AK kuraĝigi junulojn kaj instruemulojn inviti IJK-n kaj ILEI-kongreson en najbaraj landoj de la UK lando.
4. Virinoj laboru man-en-mane, kaj kunlaboru kun Afrikaj kaj eksterafrikaj instancoj por havi fortan movadon en siaj landoj.
5. Virinoj partoprenu en ĉiuj agadoj de esperanto kaj verku esperantaĵojn, konsciante ke virinoj havas grandan rolon en la Esperanto-movado.
6. Senegalo estas strategia lando por atingi la najbarajn landojn, AK helpu al la enlanda movado, akompanu esperantistojn, por plifortigi la movadon.
7. La modernigo de la instruado en Afriko estas granda neceso, AK pripensu kiel ekinstrui Esperanton per la reto.

AMO 98 kaj 99 – konkretigoj

AMO 98: Okazos la 19-an de februaro, 2023 en Zagrebo, Kroatio. Estos hibrida kunsido, virtuale per **ZOOM**: 14.00-18.00 (UTC+1). Temo: 'Amikeco: ni nutru ĝin kiel oni nutras fajron'. Temas pri la ĉiujara festado de la Semajno de Internacia Amikeco delonge festata de UEA kaj en pluraj landoj, inkluzive de Kroatio. Ankaŭ ĉi-jare okazos en Kroatio foto-konkurso. Temo sama kiel de la seminario. La fotojn oni sendu ĝis la 10-a de februaro 2023 al la retadreso: hes.keu@gmail.com

AMO 99: Okazos inter la 4-a kaj 7-a de marto en Pardubice, Ĉeĥio, kunlabore kun la fervojistoj en IFEF kaj la projekto VERDEN de IFEF kaj la faciliga instanco Kosmo. La temo certe rilatos al la evoluigo de la fervojoj. Estos hibrida kunsido.

Parizo superas sin mem

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: supera kurso

Gvidantonomo: François LO JACOMO

Tipo: Nova movada kurso

Loko: Parizo, Francio

Aldoninto: f_lojacomo

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27499>

Forpasis Francis Bernard

Certe pli ol unu tie ĉi, precipe franc-lingvanoj, konas s-ron Francis Bernard, iaman redaktinton de la revuo *espéranto-Info*. Laŭ la ĉi-suba retpoŝtaĵo de Céline BERNARD en la franca, li forpasis la 6-an de januaro 2023 en aĝo de 85 jaroj. Kondolencon al la familio kaj kuraĝon al Céline!

Ni ANF-anoj anoncas al vi la tristegan novaĵon pri la forpaso de Patrick, unu el la prizorgataj infanoj de ANF. Kio okazis? Du knaboj batalis kaj vidante ilin, Patrick kuraĝe volis disigi la du batalantajn knabojn. Malfeliĉe unu el ili kolerege ĵetis ŝtonegon, kiu trafis Patrick kaj eĉ gravege vundis lin. Tuj oni alportis lin al la hospitalo, sed bedaŭrinde post kontroloj de la kuracistoj oni eltrovis ke la ŝtonego ne nur vundis lin, sed ankaŭ kaŭzis internan sangadon, kiu mortigis lin. La mortiganto plu ne estas en Goma, li forkuris jam. Karaj helpantoj, vi penadas kaj sindonadas por ke tiuj georfoj havu bonajn estontecojn.

Adjévi

Togolando en la nova jaro

La unua renkontiĝo de lomeaj esperantistoj en la jaro, sub la aŭspicio de Agado por la Progresigo de Esperanto en Togolando (APETO), disvolviĝis dum tri horoj en restoracio de la universitata centro Sankta Johano, la 07-an de januaro 2023. Partoprenis 17 personoj, el kiuj unu novulo.

La unua horo estis dediĉita al retrospektivo pri la ĵus finiĝinta jaro kaj perspektivo por la nova. La esploro fokuŝiĝis ankaŭ pri la stato de la ĝenerala movado en la kontinento, nome kial la prestiĝo de Esperanto ne ŝajnas kreski malgraŭ diversaj penoj tiucelaj. Oni venis komune al konsidero ke, tiel longe, ke la lingvolernado ne estos ligita al io praktika, povante ebligi al lingvolernintoj esperi pli bonan vivsituation, estus malfacile konvinki grandskale pri Esperanto. Jen naskiĝis proponoj pri kiel efike informi pri la lingvo kaj strategie varbi novajn personojn al ĝi. Ekzemple, celi lernejojn kaj tie ĉe la lernojara rekomenciĝo aranĝi libro- kaj kajero-donacojn al lernejoj, al kiuj oni ankaŭ informos pri la lingvo. La kunvenantoj poste spektis la filmeton kaj rigardis fotojn pri la ĵus okazinta Afrika Kongreso en Tieso, sub la gvido de Koufionou Koffitche, membro de la Afrika Komisiono de UEA, ankaŭ partopreninto de la kongreso. Ili ekinformiĝis pri la vizito de grupo de 5 gefrancoj en Togolando meze de tiu ĉi monato kaj ankaŭ pri tiu de togolando-franca paro en aprilo. La aktivajoj inkluzivis ankaŭ mallongan prezenton de Esperanto al la novulo kaj lecioneton pri salutado. Estis komuna legado el la libro *Eta Princo*.

Adjévi Adjé



Scienca kalendaro eldonita en Hispanio

La Lerneja Scienca Kalendaro 2023, eldonita de la Supera Konsilio por Scienca Esplorado de Hispanio (CSIC), ĉi-jare denove havas version en Esperanto.

La kalendaro enhavas kolekton de eventoj aŭ datrevenoj ligitaj al scienco (en ampleksa senco) por ĉiu tago de la jaro, kun speciala atento al la diverseco de la ĉefroluloj. Vi povas ĝin trovi, elŝuti kaj printi en pluraj versioj el:

<https://digital.csic.es/handle/10261/285166>

La kalendaro en Esperanto havas propran tŭiteran konton, kiu ĉiutage publikigas la koncernajn datrevenojn. Pri la tradukado zorgis teamo kunordigita de Hispana Esperanto-Federacio. Mencio pri Esperanto kaj agnosko al la kunlaboro de HEF aperas en la oficiala prezento fare de la CSIC, kiu okazis ĉi-matene, kaj kiun vi povas trovi ĉe: <https://www.csic.es/es/actualidad-del-csic/el-calendario-cientifico-escolar-2023-ya-esta-listo-con-nuevas-efemerides>

José Antonio del Barrio, Fundación Esperanto
<http://www.esperanto.es/fundacion/>

===== vortoj: 1250 =====

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis majo 2022 (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro de 2014.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.